

## Redakta noto

Finiĝas la trijara estrarperiodo 2000/2001/2002 de ISAE. Ni sukcesis, aperigi ekde 2000 (Vol.51) regule 4 kajerojn/jare, do 11 kajerojn ĝis la fino de 2002 (Vol.53) kun entute 590 paĝoj kaj 52 originalaj artikoloj. Al tio aldoniĝas n-ro 180 (SR 1/2000) kun 92 paĝoj kaj 9 originalaj artikoloj (kiun redaktis la antaŭa ISAE-estraro kaj kies enhavaj detaloj jam estas registritaj en la Bibliografio de Scienca Revuo, *Zürich*, 2000) kaj 58 paĝoj de "Faka kromkajero – Aŭtuno 2000" kaj 44 paĝoj de "Faka kromkajero – Printempo 2001" kun fiera nombro de 14 SR-kajeroj kaj entute 784 paĝoj. Mi kore dankas al miaj kunestraranoj por la iliaflanka al mia laboro – por efiki la regulan aperon de nia asocia organo – donita subteno, kies personan valoron la unuopaj estaranoj mem prijuĝu.

Tiu ĉi SR-kajero n-ro 192 (SR 4/2002) enhavas, krom interesveka historia artikolo de nia fidela ISAE-membro *Gerhard Kalkhof* kaj terminologia kontribuo el la plumo de nova ISAE-membro *Constantin Dominte*, enkondukan artikolon pri "La nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" kiu aperis en julio 2002. Jes, nian pli fruan tole binditan "verdand biblion" de 1970 kaj ties postajn laŭ foto-procedo reproduktitajn eldonojn anstataŭas nun brile ruĝbrunkolora glatkovrila libro, al kies akronimo NPIV ni devas alkitimiĝi. ISAE estas feliĉa, havi eĉ du membrojn, kiuj jam faris kritikajn recenzojn pri tiu tre grava eldonaĵo: nia vicprezidanto prof. *Otto Haszpra* kaj nia honora membro d-ro *Josef Kavka*.

Scienca Revuo ĝojas publikigi la kontribuadojn de ambaŭ aŭtoroj. Tiu de *Haszpra* – post enkonduka historia superrigardo pri la evoluo de la Esperantaj difin- aŭ klarigvortaroj – traktas ĝeneralajn kaj kritikajn rimarkojn kun praktikaj konsideroj pri NPIV mem. Por atingi pli vastan legantaron ĝi aperas krom en tiu ĉi Scienca Revuo 4/2002 ankaŭ en la pli beletra "Debrecena Bulteno".

La opinio de d-ro *Kavka* pri NPIV jam aperis en la periodaĵo "Starto", do ankaŭ tio estas atingebla por pli vasta legantaro. Mallonga kontribuo aperas en la sekcio "Terminologia angulo" de tiu ĉi kajero, sed por publikigo de pluaj detalaĵoj li sumigos siajn kritikajn faksciencajn rimarkojn en la venonta SR 1/2003 sub la titolo "Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al la nova PIV)".

Ni pensas, ke la opinioj de la du fakuloj povas interesi ne nur sciencistojn, sed pli vastan legantaron, kaj ni esperas, ke ambaŭ kontribuoj vekos emon al pluaj diskutoj, ekz. kadre de nia nova rubriko "Leteroj de legantoj" en Scienca Revuo, al kiu mi invitas niajn fake aŭ lingve interesi-tajn membrojn de ISAE.

(*R. Sachs*, prezidanto de ISAE)

## La Nova PIV (2002)

*HASZPRA Ottó*

Fine ĝi aperis! 25 jarojn post la antaŭa versio (kaj 15 jarojn post ties malgranda Suplemento). La ĝojo estas certe grandega en Esperantio. Enkonduke ni iom trarigardu la **historion de la difinvortaroj** (aŭ: **E-E-vortaroj**) de Esperanto.

### Historio de la komencoj ĝis "La Nova PIV" (NPIV)

En la komenco ne ekzistis E-E difinvortaroj. La "difinojn" donis alilingvaj ekvivalentoj de la Esperantaj vortoj. *Zamenhof* aldonis po unu folion titolitan en iu el kvin lingvoj (rusa, germana, franca, angla, pola) -Vortaro Internacia/Nacia (Vortaro por Nacianoj), kun ĉ. 900 Esperantaj radikvortoj kun alilingva traduko, al la respektivaj- (rusa, germana, franca, pola, pli poste angla) eldonoj de la **Unua Libro** titolita

– D-ro Esperanto: **Lingvo internacia - Antaŭparolo kaj kompleta lernolibro**. *Kelter*, Varsovio, 1887.

La sekva etapo estis la

– **Universala Vortaro de la Lingvo internacia "Esperanto"**, Varsovio, 1893, sankciigita enkadre de la libro de *L.L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto*, *Kelter*, Varsovio, 1905, konsistanta en la vortara parto el 2600 radikvortoj kaj el ĉies kvinlingvaj tradukoj (franca, angla, germana, rusa, pola). Poste, ĝis hodiaŭ, aperis plejparte dulingvaj Esperanto-vortaroj. Tamen ne pasis kvaronjarcento post la naskiĝo de Esperanto, kaj aperis la unua kaj poste aliaj **pli kaj pli alte evoluintaj difinvortaroj Esperanto-Esperanto**. Jen, la plej gravaj ĝeneralaj (ne fakaj) difinvortaroj de Esperanto estis (kun citaĵoj, se ne alimaniere indikitaj, el la Enciklopedio de Esperanto, Budapeŝto, 1934):

– *Kabe (K. Bein): Vortaro de Esperanto*. Aperis (eble en Varsovio) en 1910 sur 175 paĝoj. Ĝi "celis doni la tute bonajn fidindajn vortojn, kiujn sentime la esperantistoj povas uzi" (*C. Bourlet*). "...la